



# INFORMILO 4

Aprilo 2023 Kol. 455/39

XX  
**Enhavo:** Eŭropaj fervojoj MEC Memoro pri holokaŭsto Infana kongreseto Novelo-konkurso Kultura diverseco El la redakcio  
XX

## **Pardubice: La seminario „Eŭropaj fervojoj“**

6.3.2023 La universitato en Pardubice, „Transporta fakultato de Jan Perner“ kunlabore kun la Ĉeĥa fervojista Esperanto-asocio preparis en la urbo Pardubice (Ĉeĥio) la seminarion „Eŭropaj fervojoj“, kies temo estis „Daŭripova fervojtransportado“. La unua preleganto Rodica Todor prezentis la Verden-projekton, poste Lars Sözüer prelegis pri fervojo kaj biciklado. Sekvis prelego de Vito Tornillo pri Intermodala transporto en Italio kaj najbaraj landoj. Post paŭzo ni havis eblecon aŭskulti la prelegon „Ĉeĥa Fervojadministracio *Správa železnic, s.r.o.* kaj strategio de daŭripova evoluo“ de Roman Štěrba. La lasta prelego de



Francesco Maurelli estis dediĉita al rilatoj inter robotiko kaj daŭripoveco.

Ĉiuj prelegoj estis tradukitaj en la ĉeĥan lingvon krom la prelego de R. Štěrba, kiu prelegis ĉeĥe, sed lia prelego estis tradukita en Esperanton. La tradukado estis grava, ĉar partoprenantoj ne estis nur esperantistoj, sed ankaŭ neesperantista publiko, ĉefe studentoj, instruistoj kaj fakuloj pri fervojo. Surloke partoprenis 36 aŭskultantoj kaj multaj aliaj uzis eblecon spekti la seminarion per interreto, inter ili esperantistoj el Pollando, Slovakio, Hungario, Rumanio, Kroatio, Italio, Germanio, Danio, Francio kaj Belgio. Inter la partoprenantoj ne mankis membroj de AEH. Por ili estis la plej interesa la prelego de Lars Sözüer, ĉar biciklistoj kaj handikapuloj en trajnoj ofte



uzadas la saman spacon en la trajno.

Post la prelegoj okazis faka ekskurso al universitata trafik-salono, kie la partoprenantoj povis provi regi itineron de trajnoj.

La seminario okazis kiel parto de la projekto **Verden**

(EU-projekto pri daŭripoveco kaj transporto) en la kadro de la 30-a datreveno de la ekesto de la Fakultato de Transporta Inĝenierio de la Universitato Pardubice.

La seminarion preparis sinjoro doc. Jaroslav Matuška, kiu estas membro de AEH kaj sinjoro Ladislav Kovář vicprezidanto de la Ĉeĥa fervojista E-asocio.

L. Hakl

# La Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

25.2.2023 - 4.3.2023

MES estas printempa unusemajna renkontiĝo de esperantistoj en suda Francio en agrabla loko ĉe la Mediteranea maro. Tie ni loĝis en bela hotela restadejo *Val d'Esguière*, antaŭe palaco en la tridekaj jaroj, kaj nun nomata "*Village Club Miléade*". La hotelo kaj la parko estas bone prizorgataj, la personaro estas agrabla. Ĝi estis renovigita, aldoniĝis kelkaj novaj instalaĵoj, ekstera naĝejo, tenisejoj, "Spa"-centro por homa bonfarto (natura kosmetiko, masaĝoj, magnetismo, banoj).



Ĉi-foje kolektiĝis 90 partoprenantoj el naŭ landoj por kune ĝui kursojn, diversajn prelegojn, posttagmezajn promenojn, ekskursajn vojaĝojn, vesperajn distraĵojn. Inter ni estis ukraina familio;

patrino kun du ĉarmaj geinfanoj, rifuĝintinoj gastantaj ĉe franca familio loĝanta en Parizo.

Ĉe la alveno, la nova hotelestro bonvenigis nin en la franca lingvo kaj bondeziris al ni agrablan restadon. Li ankaŭ prezentis al ni la ĉefprizorganton de la kuirejo kaj animantimon de la hotelaj aktivaĵoj. Andreo Grossmann brile tradukis lian paroladon. Poste ni tostis per aperitivo, interkoniĝis kun novaj partoprenantoj kaj gaje dancis farandolon. Ĝi estas provenca ritma viveca ĉendanco, dum kiu la dancantoj manenmane serpentumas inter la publiko. Mi transdonis salutojn al la

partoprenantoj de Rosa Lopéz kaj Sol kun Francisc, kiuj ne povis ĉeesti la aranĝon. Christine prezentis la semajnan programon kaj la tri instruistinoj nelonge parolis pri instru-metodoj en siaj respektivaj kursoj.

Dum la tuta semajno okazis instruado de Esperanto en tri kursniveloj: la 1-a por komencantaj parolantoj estis gvidata de Zsófia Kóródy, la 2-a por progresantoj gvidata de Mireille Grosjean, la 3-a pri literaturo gvidata de Spomenka Štimec. Dimanĉon la 26-an de februaro okazis kunveno de la ĝenerala asembleo de Esperanto-Provence. Antaŭ la posttagmezaj kursoj, Svitlana el Ukrainio rakontis pri sia lando, konigis nin pri la historio, kulturo, folkloro, lingvo kaj pri aktualaj okazaĵoj en la nuntempe okupata lando.



Dimanĉe antaŭ la tagmanĝo ni fotiĝis por la ĵurnalo *Var-Matin*, en kiu poste estis aperigita artikolo pri nia staĝo, akompanata per la komuna foto. Post la tagmanĝoj estis libera

tempo por promenado en la naturo aŭ por partopreni posttagmezajn ekskursojn al vizitindaj lokoj. Estis proponataj vizitoj al *San Peire*, lagetoj de *Villepey*, klostro en *Fréjus*, muzeo en *Saint-Raphaël*. Interesaj estis la vizitoj de abelejo en *Esterel*, de la muzeo de la fera Masko kaj de Reĝa Fortikaĵo en la insulo *St. Marguerite*. Ankaŭ la hotelo proponis aktivaĵojn, en kiuj ni povis partopreni. Iuj preferis kartludi, triki, prilabori broĉojn aŭ tutsimple babili. Carmen, per sia nekutima brodita vestaĵo, propagandis Esperanton per simplaj frazoj. Dum la

kafo-paŭzo eblis salteti super la longa turniĝanta ŝnuro aŭ rigardi foto-albumojn pri pasintaj renkontiĝoj en *Les Issambres*.

Vespere, kiel kutime, okazis diversaj prelegoj. La unuan vesperon Mireille Grosjean prezentis diversajn stilojn de arkitektoj. "Arto, lingvo - ĉu paraleloj eblas?" En la lunda vespero ni spektis filmon pri abeloj kaj Philippe Chavignon rakontis pri bredado de abeloj, pri kio li estas fakulo. La postan tagon ni vizitis liajn abelujojn en la naturo kaj povis aĉeti mielon. La sekvantan vesperon Spomenka Ŝtimec parolis pri la ĉeĥa juddevena kaj denaska esperantista knabo Petr Ginz, kiu famiĝis pri sia desegnaĵo de "La Tero vidata de sur la Luno", kiu aperis ankaŭ sur ĉeĥa poŝtmarko. Merkrede, post la vizito al Margarita insulo, kiun la organizantoj donacis al ni senpage, Hannes Larsson prezentis sian libron pri dulingva (angla kaj franca) krimromano, en kiu Esperanto ludas rolon por propagandi ĝin al la publiko. Ĵaŭde vespere Mireille kaj Spomenka parolis pri Hektor Hodler kaj pri lia patro, fama pentristo.

Dum la lasta vespero okazis loterio, en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero estis dediĉita al prezentadoj de diversaj kantoj, skeĉoj, kiujn la partoprenantoj mem pretigis. Aperis plurlingva sceno de vulpo kaj korvo, tri friponoj, fiŝvendisto, problemo kun lavaŝino ktp. La plej amuza estis sceno pri ebrulo inspirata de la poemo de William Auld "Ebrio". Ĉe la fino prezentiĝis la ĥoruso de Bernard Bigonnet. Sekvis dankoj al la organizintoj kaj al la instruistoj. Muziko de saksofonoj kaj akordionoj dancigis la partoprenantojn ĝis la noktomezo.

Sabate matene jam pluraj samideanoj adiaŭis nin kaj revenis al sia hejmo. Tamen daŭris la kurso de Spomenka, kaj en la apuda salono Nina el Rusio prezentis al ni rusajn

pentristojn: Vasily Kandinsky, Kasimir Maleviĉ, Marc Chagall kaj Konstantin Vasiljev.

Jam la 15-an fojon la Esperanto-grupo de St. Rafael kaj Freĵus sub la gvido de Monique Prezioso kaj de Christine Graissaguel kun pliaj helpantoj organizis MES, laŭdire la lastan. Tamen estas espero, ke novaj organizantoj transprenos la taskon por daŭrigi la printempan tradicion de tiuj agrablaj semajnoj.

Dankon al ĉiuj kontribuintoj en la aranĝo, pri kiu ĉiuj estis kontentaj strebante al progreso de sia lingvonivelo. Ni ricevis multajn valorajn informojn pri Esperanto-kulturo. Specialan dankon ricevu la tuta familio de Monique Prezioso, kiu multe helpis en la organizado kaj dum la aranĝo mem.

*Liba Gabalda*

## **MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA INTERNACIA TAGO DE HOLOKAŬSTO- MEMORO, la 27-an de januaro 2023**

La holokaŭsto-memoro kaj klerigo pri viktimoj kaj supervivintoj de naziismo estas ne nur momentoj de funebro kaj honorigo. Ili estas ankaŭ gravaj atentigoj pri nuntempaj viktimoj de persekutado kaj misinformado. Pli ol ĉiam, ni bezonas kontraŭbatali malaman paroladon, antisemitismon kaj aliajn antaŭjuĝojn, kaj preventi genocidon.

Ni aparte memoras la familianojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kaj la multajn aliajn persekutitajn esperantistojn, kiuj perdis sian vivon. Preskaŭ ĉiuj rektaj familianoj de Zamenhof pereis: nur unu lia nepo

transvivis tiujn terurajn jarojn. La Nazia Germanio kontraŭstaris Esperanton, ĉar ĝia kreinto estis judo kaj pro la tutmondistaj kaj homrajtaj idealoj de la Esperanto-movado.

UEA funebras tiujn kredantojn pri internaciismo kaj internacia kompreniĝo, kiuj ĉu pro sia raso aŭ fizika stato, ĉu pro siaj politikaj aŭ sociaj konvinkoj, pereis sub la manoj de la nazioj. Ni honoras la memoron de la multaj esperantistoj, kiuj tiel pereis kaj ni rekonas la sindonon kaj kuraĝon de tiuj, kiuj defiis la fortojn de teroro por savi tiujn malmultajn, kiuj minacatajn de murdo, transvivis.

Nia asocio prenas homajn rajtojn tiel, kiel ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, kiel ĝeneralajn principojn kaj esencajn kondiĉojn de nia agado. Kiel movado, kiu strebas al interhomaj kompreniĝo kaj kunlaboro, ni solene promesas, fronte al la ekzemplo de la Holokaŭsto, fari nian eblon rezisti maljustecon kie ajn kaj kiam ajn ĝi okazas.

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

## **51-A INTERNACIA INFANA-ADOLESKANTA KONGRESETO (IIK) INVITAS!**

Lige kun la 108-a UK en Torino okazos samtempe, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023, ankaŭ la 51-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) meze de la Parko La Mandria, apud Torino, Piemonto, Italio. Bonvenu viziti la retejon de IIK: [iik.uea.org](http://iik.uea.org).

La temo de la kongreseto estas “Sporto kaj Naturo”.



La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto en natura medio. Okazos ludoj kaj sporto, natursciencaj atelieroj kaj biciklado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vesperaj ludoj kaj interesaj vesperaj agadoj atendas la infanojn kaj adoleskantojn.

IJK bonvenigas partoprenantojn de diversaj aĝogrupoj, kiuj parolas Esperanton (minimume – scipovas baze kaj klare esprimi siajn bezonojn kaj dezirojn en Esperanto):

- infanoj kaj adoleskantoj estas la kutimaj IJK-partoprenantoj
- adoleskantoj ekde 17 jaroj kaj fluparolantaj povas fariĝi helpantoj
- infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron/prizorganton/vartiston dum IJK.
- En la retejo vi trovos pliajn informojn kaj la aliĝilon, kie ĉiu infano povas indiki siajn ideojn por la programkontribuoj, kio certe eĉ pli riĉigos la eventon. Pri ajnaj demandoj bv. skribi al [infana.kongreseto@gmail.com](mailto:infana.kongreseto@gmail.com).

Ni ankaŭ invitas vin subteni la partoprenon de infanoj/adoleskuloj el nepagipovaj landoj en la IJK per mona donaco al la kongreseto ([uea.org/alighoj/donacoj](http://uea.org/alighoj/donacoj) UEA-kontoj: *Adoptaj Gepatroj* kaj [Infana kongreseto](http://uea.org/alighoj/donacoj)). Ni kore dankas ĉiujn donacantojn. Bonvenon al la Torina IJK!

El la Gazetaraj Komunikoj de UEA



# INTERKULTURA NOVELO-KONKURSO

La Interkultura Novelo-Konkurso (INK) revenas kun la temo *La sekreta vivo de miaj najbaroj*. La tria eldono de la konkurso estis lanĉita de Akademio Literatura de Esperanto (ALE) kunlabore kun Bobelarto kaj aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio (UEA). La konkurso celas instigi novel-kreadon de aŭtoroj el diversaj kulturoj.

Krom la temo *La sekreta vivo de miaj najbaroj*, du novaĵoj atendas la partoprenantojn en la ĉi-jara Interkultura Novelo-Konkurso: nun eblas konkursi per **ses lingvoj** kaj estas **dek monpremioj** por gajni.

Krom Esperanto, la itala, la rusa kaj la ukraina, kiuj estis akceptitaj en la dua eldono, aldoniĝas ĉi-jare la kataluna kaj la persa. Tamen tradukaĵoj el aliaj lingvoj bonvenas.

La noveloj devas esti neniam antaŭe publikigitaj. La teksto-proponoj devas havi **maksimume 2000 vortojn** (proksimume 6 paĝojn). Ne estas minimuma longeco. La konkurso permesas uzadon de artefarita intelekto (AI) por kontribui al la verkado, ties uzon oni devas menciigi en la sendoformularo. Konkursi eblas per **du noveloj**.

La ĵurio konsistas el reprezentantoj de diversaj kulturoj. La gajnintoj estos anoncigitaj dum la 109-a Universala Kongreso de UEA en 2024. En la por-komencanta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 500, 400, 300, 200 kaj 100 eŭroj, respektive. En la sperta kategorio, la aŭtoroj de la kvin gajnintaj noveloj ricevos premiojn de 1000, 800, 600, 400 kaj 200 eŭroj, respektive.

La limdato por konkursi estas la 30-a de septembro 2023.

Vidu ĉiujn informojn kaj detalojn pri la konkurso ĉe:

[bobelarto.ink/konkurso](http://bobelarto.ink/konkurso).

Kadre de la dua eldono, kies temo estis *Nokta vojaĝo*, la Interkultura Novelo-Konkurso ricevis 421 konkursantajn novelojn de partoprenantoj el 39 landoj. La ĵurio aktuale laboras pri la juĝado de la selektitaj noveloj. La gajnintoj estos anoncituraj kaj la novel-rikolto lanĉita dum la venonta 108-a UK, okazonta en Torino (29 julio-5 aŭgusto 2023). Por aliĝi al la kongreso, vizitu: [uea.org/kongresoj/alighilo](http://uea.org/kongresoj/alighilo).

*Amo, tuso kaj forpaso*, la novel-rikolto de la unua eldono de la konkurso estas aĉetebla en la [Libroservo de UEA](#) kaj ĉe [eldonejo KAVA-PECH](#).

Mesaĝo de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Irina Bokova, okaze de la

**Monda Tago de Kultura Diverseco** por dialogo kaj evoluo.

Antaŭ 70 jaroj la fondintoj de Unesko esprimis simplan konvinkon: la reciproka nekompreneo kaŭzas malfidon kaj miskomprenojn inter la popoloj, la strebo al paco alvokas por la fortigo de reciprokaj konoj inter kulturoj kaj popoloj, por pli bona interkompreniĝo.

La kultura diverseco estas nia komuna havaĵo kaj la plej granda ŝanco de la homaro. Ĝi ebligas renoviĝon kaj dinamismon, ĝi estas la motoro de novigo kaj evoluo. Ĝi estas invito al dialogo, al malkovro kaj kunlaboro. En tiom diverseca mondo la detruo

de kulturoj estas krimo, kaj la unuformeco estas senelirejo: ni devas strebi al samtempa plifortigo kaj de la diverseco, kiu nin riĉigas, kaj de la homaj rajtoj, kiuj nin kunigas.

Tiu ĉi nedisigebla ligo inter la kultura diverseco kaj la homaj rajtoj estis rememorigita kun emfazo per la adopto en 2001 - ĝuste post la detruo de la Budho-statuo de Bamiyan en Afganio - de la Universala Deklaracio de Unesko pri Kultura Diverseco. Tiu teksto estas vojmontrilo por kunvivado en nia tutmondiĝanta epoko. Ĝi rekonfirmas la fakton, ke la respekto de la kultura diverseco kaj la respekto de la homaj rajtoj estas nedisigeblaj.

Hodiaŭ ankoraŭ, la kultura diverseco estas atakata de ekstremistoj, kiuj neniigas la kulturen havaĵon kaj persekutas la minoritatojn. Ĉi tiuj krimoj plifortigas nian konvinkiĝon pri la fakto, ke la malamiko de la homa digno ĉiam volos detrui la kulturen diversecon, ĉar ĝi estas simbolo de la penslibereco kaj de la senfina homa krea kapablo. Tiun ĉi ligon ni devas defendi. Reage al ĉiuj tiuj, kiuj volas malpermesi la diversecon kaj la plurecon de ideoj, opinioj kaj kredoj, ni devas protekti la liberecon per la riĉeco de niaj kulturoj kaj per niaj kreaĵoj.

Tio ĉi estas la signifo de ĉi tiu Monda Tago de Kultura Diverseco por dialogo kaj evoluo. Ĝi estas okazo manifesti la korean kapablon de niaj diversaj lingvoj, kutimoj - kaj agi tiel, ke tiuj diversecoj riĉigu, fortigu nin, anstataŭ nin dividi. La vortoj de la Konstitucio de Unesko, redaktita antaŭ 70 jaroj, ne maljuniĝis: dialogo povas forigi ĉiun miskomprenon kaj malfermas senfinajn eblojn de vojoj al paco kaj evoluo.

Irina Bokova

Esperanta traduko: Stefano Keller, Universala Esperanto-Asocio (UEA)

El la retejo de la Agado por Lingvaj Rajtoj en la mondo.

### **Ekskuzo el la redakcio:**

Kompletigo al **Rakonto pri cikonia familio** el la marta numero de Antaŭen: Aŭtorino de la rakonto estas **Petra Adamcová**, kunlernantino el gimnazio de Inĝ. Josef Vojáček, kiu tradukis la Rakonton. Tre ĝojigas nin, ke la rakonto plaĉis al multaj niaj legantoj.

**Gajan Paskon** en sano kaj bonfarto deziras al vi la redaktorinoj.



**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**  
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,  
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: [ah@esperanto-ah.eu](mailto:ah@esperanto-ah.eu) interreto: [www.esperanto-ah.eu](http://www.esperanto-ah.eu)

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

**IBAN:** CZ352010000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.